

Prelego de Emmanuel Rolland :

## « Por ke la homoj revenu al la naturo, unue eduku infanojn »

### Enkonduko en la kongreslibreto

*De 30 jaroj, la ĝardeneto de la lernantoj estas asocio, kiu disvolvas plezuron de kultivado al infanoj. Vidu la retpaĝon : <http://gxardeneto.chez-alice.fr/>*

*Emmanuel Rolland ne ĉesas, de multaj jaroj, interesege infanojn al natura medio.*

*« Kiam lernado iĝas ĝojo kaj interesege, la lernejo plenumas siajn taskojn ». La asocio disvolvas metodojn por faciligi malkovron de naturo en klasĉambro. La lernantoj eksperimentas konkrete.*

*La konkretaj aĵoj estas pli agrablaj por infanoj kaj permesas iri al intelektaj aĵoj.*

*Infanoj iniciĝas al la unua kulturo, sen kiu nenio alia ekzistus.*

*Imagu infanojn, kiuj semas kernon de persikarbo dum februaro, en junio persikarbo altas je 60 cm, instalita en kreskakcelejo, ĝi mezuras 1,7 metroj septembron. Eksterordinara por infanoj, kiu komunikas tion al siaj gepatroj kaj tiam interesiĝas pri lernejo.*

*Emmanuel Rolland prezentas la laboron de la asocio kaj ĝian disvolviĝon tra la mondo.*

### Prelego :

Mi estas *Emmanuel Rolland*, ekde 30 jaroj aktive mi laboras por ke la infanoj lernu naturon.

Mi estas sepdek sep jara, ĉiam entuziasmiĝas kvazaŭ la komenco.

Miaj gepatroj estis agrokulturistoj, la vivo ne estis facila.

En la jaro 1947 mi eniris la liceon. Mi estis dek jaraĝa. Mi malbone travivis la lernejon ĉar ĝi ne taŭgis al mia zorgado.

Certe la lernejo kontribuis al mia pripensado.

Kiam mi estis 13 jaraĝa mi promesis min montri al la instruistoj kiel instrui.

Kiam mi ekinstruis en bazlernejo, poste mezlernejo kie mi instruis teĥnikan kaj manan edukadon, mi provis imagi pedagogian strategion por ke la instruado iĝu luda kaj efika. La klasĉambroj estis por mi eksperimentejo.

Mi eksperimentis en la mezlernejo de Plouer sur Rance (Pluer sur Ranc) apud Dinan, arbovartejon. Tio estas, laŭ strikta senco de la vorto "*kolekto de nur arboj, artefarita arbaro*", plie mi kovris la grundon per diversaj tavoloj de vegetaloj.

En la jaro 1980, mi forlasis la instruadon kaj kreis la "*ĝardeneto de la lernantoj*" uzante la kelkajn hektarojn ĉirkaŭ mia domo. Mi spertis konkrete miajn ideojn.

En la retpaĝo la ĝardeneto de la lernantoj vi povos trovi filmojn kiuj prezentas tiun kreadon.

Por ebligi instruistojn transdoni al la lernantoj la plezuron de la ĝardeno, mi kreis ilojn kaj metodojn.

### Ekzemple :

la plastaj boteloj de 1,5 litroj kaj 5 litroj estas la plej bonaj iloj por kreskigi la plantojn kaj transplanti ilin en la grundo. La plastaj boteloj povas esti uzitaj ene kaj ekstere. La botelo suba utilas kiel akva rezervujo, konsekvence kiam la lernantoj ferias, la plantoj ne suferas pro manko da akvo.

Per tiu plasta botelo vi povos enterigi la planton dum la tuta jaro sen traŭmata ŝoko post la transplantado kaj eĉ oni konstatas tujan kreskadon. Ankaŭ, per la plasta botelo vi povos duobligi plantojn per markotada metodo uzante 2 plastajn botelojn.

Plie la plastaj boteloj estas senpagaj kaj ankaŭ la grundo.

Tiu metodo ne malpurigas la klasĉambrojn. Per tiu ilo la instruisto povas instrui al la lernantoj la naturon. La spertoj povas esti faritaj en la klasĉambroj.

La plasta botelo estas kreskakcelilo.

La ĝardenado iĝas scienca provo. La boteloj de 1,5 kaj 5 litroj estas tiom da provtubo. Ili estas transporteblaj.

Mi konstatis ke la infanoj zorgas pri la plantoj de maten-alveno kaj dum la tago rigardas ĝin kaj prizorgas. Kiam mi vizitas klasĉambrojn, infanoj venas montri al mi siajn plantojn. Tio pruvas la intereson pri la laboro. La klasĉambro iĝas ejo de spertado. La gejunuloj venas kun plezuro en la lernejo. La ĝojo plenigas la klasĉambrojn kaj plie la pasio. Tiu pasio kiam mia avino komunikis al mi montrante kiel stiki nigran rubujon.

Imagu infanon kiu transportas greftitan pomarbron hejmen kaj plantas ĝin je la fino de junio respektante la kreskakcelilon, li manĝos siajn pomojn dum sia vivo. Mirinda memoraĵo en sia kapo sed ankaŭ en sia ĝardeno.

Apud Dinan, en la mezlernejo de Vildé-Guingalan (Vilde-Gengalan) la instruisto uzas tiun teĥnikon por lerni la naturon al la infanoj. Aliaj instruistoj uzas niajn metodojn sed oni ne konas ilin, kelkfoje estas ĵurnala artikolo kiu komunikas tion al ni.

### **Ankoraŭ mi kreis:**

- la permakulturon oaze per rotacio dum tri jaroj. La unuan jaron ni kultivas kukurbojn kaj maizon kiu utilas kiel pajlo-kovrado dum la du venontaj jaroj. La duan jaron aliajn plantojn kaj ankoraŭ aliajn plantojn la tria jaro. Por ne premi la grundon ni uzas erojn de ŝtono aŭ betono por ĝardeni kia ajn vetero.
- diversajn ilojn por faciligi la ĝardenadon, kiel la "culbutoculteur" kultiv-renversilo pri kiu mi ricevis la or-medalon dum la konkurso "lépine" en Parizo dum la jaro 1993.
- laste la guĝo-semilon kiun la media doktoro François Plassard deziras rekomendi kiel paŝbastono por la ekskursantoj por semi laŭ longe de la vojeto.

### **Disvastigado de miaj konvinkoj:**

Je la komenco la disvastigado estis farita per la internacia lingvo, Esperanto.

La kreado de la retpaĝo "la ĝardeneto de la lernantoj" kun la helpo de Alain Gilfort kaj doktoro Denis-Serge Clopeau.

Do pluraj homoj vizitis niajn ejojn kaj vojaĝis kaj transplantis niajn metodojn:

- Pierre-Yves Herrouet en Argentino kaj Bolivio,
- Jacinto Rodriguez, Paolo Pereira, Emanuel kaj Amendeo disvastigas mian laboron ĉe la instruistoj en Portugalio,
- Luis Romani, instruisto por la instruistoj de Steiner lernejo de Katalunio en Hispanio,
- Metchild Berning en Germanio ĉe la instruistojn,
- Sven Aubert, la sama laboro en Svisio,
- Arnaud Coquillard en Australio,
- Sun Choi en Koreio,
- la profesoro Montagné en Korsiko en la insulo "Rousse".

Vi povos trovi nian tutan laboron en la retpaĝo:

<http://gxardeneto.chez-alice.fr/eo/akcepto.html>

en la franca retpaĝo, multaj filmetoj prezentas niajn metodojn:

<http://gxardeneto.chez-alice.fr/fr/retfilmoj.php>

ankaŭ, ni havas blogon en kiu aperas novaĵojn:

<http://lepetitjardin22.canalblog.com/>

Kiel diris al mi Francis Bernard, redaktisto de Espéranto-Info: "nur restas krei tion sur ĉiuj

tegmentoj!"

Sola ne estas facila sed kun via helpo ĉio iĝus ebla: Kune ni povos kontribui ŝanĝi la socion.